



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2025 (235)

28. 11. 2025

Sternenhoch denove surscene



Foto: E-mental'

La sukcesa opero Sternenhoch de la komponisto Ivan Acher, kies libreto estas en Esperanto, ree aperas sur scenejo. Ekde la komenco de novembro 2025 ĝi estas prezentata en la teatro ABC en Prago. Kelkaj esperantistoj ĉeestis la premieron.

EL LA ENHAVO

Šestý Virtuální kongres esperanta	3
Memortabulo de Barrande renovigita	6
Trovita en vizaĝlibro de Jiří Caletka	8
Thatcher kaj la monumento de Churchill	12
Jára da Cimerman	14
Verda stelo	20
El la epistoloj de sankta Paŭlo	22

O časopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

Okazintaĵoj

06/11/2025 – prezentado de Pavla Dvořáková pri la muzika programo dum la UK en Brno, 1-a parto (*klubejo*)

20/11/2025 – prelego de Margit Turková pri la temo „EK Prago – nesto de poetoj“ (*klubejo*) – registraĵo trovebla en [nia jutuba kanalo](#)

Venontaj aranĝoj

04/12/2025 – prelego de Pavla Dvořáková pri la temo „Surspure de doktoro Zamenhof, 5-a parto (*klubejo*)“

06–07/12/2025 – 11-a Granda lokŝumado en Bratislavo

12–14/12/2025 – 10-a Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio (*Leipzig*)

16/12/2025 – Zamenhofa tago (*apud la Kongresa centro*)

18/12/2025 – Kristnaska kunveno (*klubejo*)

Výročí Jiřího Karena



V letošním roce si připomínáme 100. výročí narození a 25. výročí úmrtí našeho významného člena, básníka Jiřího Karena. Při této příležitosti bychom chtěli upozornit na nahrávky dvou zajímavých akcí, které se uskutečnily na Praze 10 v roce 2016. Nahrávky jsou dostupné na YouTube na kanálu Společně pro Desítku.

Jde o videa:

- [Den poezie v Malešicích - Tam, kde skřivan zpívá na betonu - Jiří Karen a](#)
- [Jiří Karen a Zuzana Podmelová: „Čtverec nad přeponou lásky“.](#)

Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové členské příspěvky na rok 2026. Výše ročního příspěvku činí 200 Kč; pro studenty a seniory 100 Kč. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na bankovní účet č. 2801096435/2010. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, misuj@email.cz.

Šestý Virtuální kongres esperanta se blíží!

Pavla Dvořáková



Neměli jste možnost účastnit se osobně letošního 110. Světového kongresu esperanta v Brně, nebo na něm nestihli některé pro vás zajímavé programy? Nevadí! 4.-7. prosince 2025 si to můžete alespoň zčásti vynahradit na šestém Virtuálním kongresu – a individuální členové UEA na rok 2025 či 2026 dokonce zcela ZDARMA!

Virtuala Kongreso je největší internetová akce pro esperantisty, kterou organizuje od r. 2020 UEA (Světový esperantský svaz) ve spolupráci s TEJO, Eurokka/Vinilkosmo a E@I. Nápad uspořádat ji vznikl v covidovém roce, kdy musel být zrušen Světový kongres v Montrealu a byly hledány možnosti alespoň dílčí náhrady. Pro velký úspěch se začal tento kongres konat pravidelně vždy koncem roku. Loni se na něm sešlo celkem 1256 účastníků z 89 zemí světa.

Virtuální kongres je bohatý na zajímavé přednášky, panelové diskuse, mninikurzy a workshopy na různá témata, umělecké a kulturní prezentace i společenský program. S nejvyšší pravděpodobností do něho bude zařazena i minimálně část přednášek a koncertů z 110. Světového kongresu esperanta v Brně. Akce je vhodná pro zájemce různých úrovní jazykových znalostí.

Poplatky:

- Individuální členové UEA přihlášení do 23. 11. 2025 mají účast ZDARMA.
- Případní zájemci se mohou přihlásit do UEA na rok 2026 (od 2 do 44 Euro) a tím získat rovněž účast na VK zdarma.
- Poplatek pro nečleny UEA činí 50 Euro (rovněž do 23.11.2025).

Podrobnosti naleznete na stránce <https://vk.esperanto.net/2025>. Na ní rovněž mohou zájemci nabídnout svůj příspěvek do programu.

Konkrétní program je momentálně připravován a bude zveřejněn na platformě [Eventaservo.org](https://eventaservo.org).

Využijte této mimořádné příležitosti z pohodlí svého doma a za mimořádně výhodných podmínek zúčastnit se dle svého výběru pestrého kvalitního programu a být v kontaktu s esperantisty z celého světa! I když máte např. čas pouze o víkendu, jistě se vám i zkrácená virtuální účast na této mimořádně akci vyplatí!



E-mental' en Sicilio, novembro 2025 – boatado ĉe Marzamemi

Internacia post-baza kurso en la Jagelona Universitato

La Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, invitas esperantistojn el la tuta mondo al forta internacia post-baza kurso B1.

La kurso estos gvidata en interreto, vive, realtempe. Instruos Maria Majerczak. Intensiva parolado kaj skribado. Interesaj materialoj. Ĉiu kursano estas bone prizorgata. Ne estas aĝo-limo. 7-monata kurso, kun lecionoj okazantaj 1-foje semajne.

La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas, krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la prestiĝa, internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

Studu Esperanton ĉiusemajne kun gesamideanoj en diversaj landoj, sen eliri el via hejmo.

Limdato por aliĝi: 17 novembro 2025 aŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj.

Pli da informoj pri la kurso: <https://bit.ly/37MIYye>

Invitas kore

Maria Majerczak

Gvidantino de la E-instruado en la Jagelona Universitato

Kuro por Paraple 2025

Vlasta Pištíková

La 5-an de oktobro 2025 finiĝis unumonata virtuala konkurso „Kuro por Paraple“, kiun ankaŭ aktive partoprenis teamo ESPERANTO, kiu ĉi jare havis 24 membrojn.

Kvankam ĉi-jare la organizantoj de la evento iom ĥaosis, la konkursantoj ne perdis entuziasmon kaj diligente kolektis kilometrojn. Dank’ al tio la teamo ESPERANTO sukcesis esti la naŭa el pli ol sepdek teamoj.

Krom la teama konkurso oni konkursis ankaŭ kiel unuopuloj en diversaj kategorioj. Tri membroj de la teamo ESPERANTO estis tre sukcesaj.

La unua piediranta viro estis David Breyer, kiu sukcesis dum la monato kolekti 716,9 km.

La dua piediranto estis Martin Vávra, kiu kolektis 528,6 km.

La 3-a plej bona konkursanto en la kategorio „malgrandaj radoj” estis Josef Kalčík, kiu sukcesis skuti 260,1 km.

Gratulon kaj al tri gajnintoj kaj ankaŭ la tuta teamo ESPERANTO.

Libere elŝuteblaj libroj de KAVA-PECH

En la paĝo <https://www.kava-pech.cz/#/cz/t/cz/free> elŝutu senpage la venontajn kvin elstarajn librojn de la eldonejo KAVA-PECH:



Velký česko-esperantský slovník

Miroslav Malovec

Dosud nejobsáhlejší u nás vydaný Česko-esperantský slovník.



Velký esperantsko-český slovník

Miroslav Malovec

Dosud nejrozsáhlejší u nás vydaný esperantsko-český slovník, obsahující cca 16 000 hesel a 40 000 odvozenin, v menším rozsahu i frazeologii.




Je Esperanto ještě aktuální?

Max Hans-Jürgen Mattusch

Přestože tato mezinárodní řeč existuje již 130 let, vyvolává stále diskuse.

Stahujte [zde](#).



Chemický slovník esperantsko-český a česko-esperantský / Ĥemia vortaro Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta

Zdeněk Pluhař

esperantsko-český a česko-



Slovensko-český a česko-slovenský slovník na cesty

Magdaléna Feifířová, Vladimír Němec

Oboustranný slovník rozdílných výrazů v češtině a slovenštině. Čtvrté vydání

Memortabulo de Barrande renovigita

Josef Kalčík

Post duonjaro en restaŭra ateliero revenis al la roko de Barrande gisfera memortabulo kun surskribo Barrande. La posedanto, Nacia muzeo, forprenis ĝin lastjare en novembro pro ĝia malbona stato kaj lasis ĝin renovigi.

Same kiel antaŭ 141 jaroj, kiam ĝi aperis unuafoje sur la roka masivo (en 1884), kontribuis al la renovigo kaj relokingo sponsoraj donacoj. Urboparto Prago 5 provizis 200 mil kronoj.



Preskaŭ kvin metrojn longa kaj 1,5 metrojn alta tabulo kun la paleontologa familinomo estis muntita en la rokmuro – kiel simbola monumento unu jaron post la morto de franca konstrua inĝeniero (B. mortis en 1883). Ĝuste laŭ li estis la roko kaj la tuta nacia natura memoraĵo nomita. Ĝi estis la unua plej aĝa protektita geologia regiono en Ĉeĥio.

La esploro de la tabulo en lasta jaro malkovris, ke ĝi atingis averian staton. Krom nekompaktaj farbotavoloj, kiuj detavoliĝis, laboris ankaŭ korodo kiu difektis ĝian statikon. Spertuloj ĝin kun helpo de profesiuloj al laboro en alteco kaj de gruo malmuntis kaj transportis en restaŭran atelieron. Per teĥniko de fajna sablado oni forigis supraĵajn malpuraĵojn, degraditajn farbotavolojn kaj korodon. La fronta flanko ricevis farbotavolon de ultramara blua koloro. La leteroj estas subkolorataj per flava farbotavolo kaj kovrataj per 13 gramoj de lamela 24-karata oro. La renovigita tabulo estas fiksita al nerustonta framo kun nova tegmentaĵo, kiu preventas

plenigadon de la spaco inter ĝi kaj roko per malpuraĵoj. La tegmentaĵo ankaŭ ebligas cirkuladon de aero, kio malrapidigas degradadon de ŝirmaj farbotavoloj kaj ekeston de korodo.

La estiĝon de la tabulo meritis plej multe Antonín Frič, eminenta ĉeĥa natursciencisto, zoologo kaj paleontologo kaj ĉefa personaĵo de

naturscienco en tiama Nacia muzeo. La festmalkovron en la 14-a de junio 1884 observis la plej grandaj personaĵoj de tiama nacia societo el vaporŝipo sur Vultavo. La roko ne estis elektita hazarde. Ĝi ne estas la plej signifa trovloko de Barrande, ĝi eĉ ne estas loko de liaj unuaj fosilioj, sed ĝi estas unu el la plej imponaj geologiaj profiloj en teritorio de Prago ege bone videbla eĉ el granda distanco. Ĝi montras detale faltigitajn kalkŝtonojn de subdevona epoko. Ili estis ekspluatataj en apudaj minejoj ĝis la 20-a jarcento.

La memortabulon produktis kaj ĝian fabrikadon per 300 florenoj sponzoris První českomoravská továrna en Libeň. Por instalado en la valoro de 572 florenoj oni organizis kolekton inter eminentaj geologoj en Usono. Grandan parton de elspezoj pagis Museum Království českého, kiel estis tiam la Nacia muzeo nomata. Malgraŭ la fakto, ke la rokoj ŝanĝis kelkfoje posedantojn, servodevo en la formo de memortabulo estis konservata al la posteuloj de Museum Království českého. En 1907 ĝi estis pro la modifo de la roko demetita kaj nove origita. La farbotavoloj estis renovigitaj denove ankaŭ en la jaro 1968.

Laŭ la artikolo de urbodoma magazino de Prago 5 el julio-aŭgusto 2025

Vortprovizo:

gisfera	litinový
averia stato	havarijní stav
korodo	koroze
farbotavoloj detavoliĝis	vrstvy barvy se odloučovaly
fajna sablado	jemné pískování
nerustonta framo	nerezový rám
ŝirma farbotavolo	ochranný nátěr
floreno	zlatý (druh mince)
věčné břemeno	servodevo



Trovita en vizaĝlibro de Jiří Caletka

Nia kolego Jiří Caletka devenas de Opava, sed li jam longe loĝas en Prago kaj aktivas en nia klubo. Li estas konata kaj ŝatata pro sia ĝoja karaktero kaj parolemo. Dum la UK 2025 li estis LKK-ano kaj ekbrilis kiel lerta kontaktpersono kun amaskomunikiloj. Eble vi ankoraŭ ne konis lin kiel aktivan kontribuanton en Facebook, kiu bone reklamas Esperanton per siaj dulingvaj afiŝoj. Ni nun rigardu kelkajn el liaj lastatempaj afiŝoj.

Antaŭ nelonge kolegino en laborejo rakontis al mi, kiel ŝia malgranda knabo antaŭĝojas aŭskulti legadon el la libro de fabeloj pri malgranda knabo Maĉjo, kiu estis verkita de fama ĉeĥa verkisto Eduard Petiška. Ŝi estis surprizita, kiam mi montris al ŝi „Maĉjon“ sur aktuala fotografiaĵo. Martin Petiška, nun ankaŭ verkisto, pri kiu lia patro verkis infanlibrojn, vizitis la pragan Esperantan klubon okaze de la publikigo de la libro de sia patro „Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago“. La libro estis eldonita en Esperanto.

Nedávno mi kolegyně v práci vykládala, jak se její malý chlapec těší na předčítání z knížky Martínkova čítanka a dvě klubíčka pohádek, kterou napsal Eduard Petiška. Byla překvapená, když jsem jí „Martínka“ ukázal na současné fotografii. Martin Petiška, dnes také známý spisovatel, o kterém jeho otec psal knížky pro děti, navštívil pražský esperantský klub u příležitosti vydání knížky svého otce „Golem a jiné židovské pověsti a pohádky ze staré Prahy“. Kniha vyšla přeložená do esperanta.

(30/10/2025)



La aŭstra esperantisto Martin Stuppniĝ hodiaŭ festas 100 jarojn. Li estas probable la lasta ano de la Montĉasistoj, kiu partoprenis la Batalon de Monte Cassino, kiu estis unu el la plej akraj bataloj dum la dua mondmilito. Mi renkontiĝis kun Martin antaŭ ses jaroj dum prezentado de lia nova libro, kiu estis publikigita ankaŭ en esperanto sub la titolo Home en senhomeco. La libro priskribas liajn spertojn dum la milito kaj ĝia titolo jam atentigas, ke eĉ en nehoma situacio oni povas ĉiam resti homo. Kaj Martin estas vere homo kun majuskla H, kaj lia homeco akompanas lin dum la tuta vivo. Kiam mi demandis lin, kion li faras por resti en tia bonega stato de menso kaj korpo eĉ en tia progresinta aĝo, li respondis, ke ĉiutage ekzercas kvin tibetanojn, promenas kvin kilometrojn kaj praktikas la aŭtogenan trejnadon de Schultz. La hodiaŭaj 100 jaroj pravas, ke la metodo funkcias. Martin, mi kore gratulas al vi!

Dnes se dožívá 100 let rakouský esperantista Martin Stuppniĝ. Jedná se pravděpodobně o posledního příslušníka Horských myslivců, který se zúčastnil jedné z nejtěžších bitev 2. sv. války o Monte Cassino. Martina jsem poznal před šesti lety při křtu jeho knihy, která vyšla v českém překladu pod názvem Vždy lze zůstat člověkem. Kniha popisuje jeho prožitky v průběhu války a již svým názvem poukazuje na to, že i v nelidské situaci se lze zachovat jako člověk. Martin je skutečně člověk s velkým Č a jeho lidskost jej provází celý život. Když jsem se jej otázel, co dělá, aby si zachoval tak skvělý stav mysli a těla i v tak vysokém věku, odpověděl mi, že denně cvičí pět tibetánů, chodí pět kilometrů a večer cvičí Schultzův autogenní trénink. Dnešních 100 let dokazuje, že metoda funguje. Martine ze srdce ti blahopřeji!

(24/10/2025)





La ĉi-jara kongreso de ĉeĥaj esperantistoj okazis en vere paradoksa loko. Ĝi okazis en la plej malnova dokumentita drinkejo en la lando, proksime al la plej nova urbo en Ĉeĥio. La taverno Jaškovská krčma estis unue skribe menciita en la jaro 1268. La urbo Havířov estis finkonstruita en la jaro 1955. Min ĝojigis, ke mi povis stari ĉe la krano en la drinkejo, kie oni servis trinkaĵojn jam en la tempo, kiam en Prago

staris trans la rivero Vltavo ankoraŭ la ponto de Judit.

Letošní kongres českých esperantistů se uskutečnil v opravdu paradoxním místě. Konal se v nejstarší doložené krčmě na území státu, poblíž nejmladšího města České republiky. Jaškovská krčma byla poprvé písemně zmíněna již v roce 1268, zatímco Havířov byl dostavěn až v roce 1955. Nedalo mi, abych se v krčmě, kde se nalévalo v době, kdy stál v Praze přes Vltavu ještě Juditin most, nepostavil za pípu.

(22/10/2025)

Mi pasigis la finon de julio kaj la komencon de aŭgusto ĉe la Universala kongreso de Esperanto en Brno, kien venis pli ol 1100 esperantistoj el 63 landoj de la mondo. Mi denove konvinkiĝis, ke daŭre validas: Se vi parolas la anglan, vi povas akiri pli bonan laboron kaj pli da mono, sed se vi scias Esperanton, vi certe akiros multe da amikoj.

Přelom července a srpna jsem strávil na Světovém kongresu esperanta v Brně, kam přijelo více než jedenáct set esperantistů z 63 zemí světa. Opět jsem si potvrdil, že stále platí: Mluvíš-li anglicky, můžeš získat lepší práci a více peněz, ale znáš-li esperanto, určitě získáš mnoho přátel.

(04/08/2025)



Post hodiaŭa renkontiĝo en la parlamento, la ministro pri kulturo certe ne opinias, ke Esperanto malprogresas 😊 De maldekstre prezidanto de Praga Esperanto-klubo Tomáš Břicháček, prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-asocio Jiří Tomeček kaj ministro pri kulturo Martin Baxa.

Po dnešním setkání v parlamentu si ministr kultury určitě nemyslí, že by esperanto bylo na ústupu 😊 Zleva předseda pražského esperantského klubu Tomáš Břicháček, předseda Českého esperantského svazu Jiří Tomeček a ministr kultury Martin Baxa.

(07/03/2025)



Margaret Thatcher kaj la monumento de Churchill

Tomáš Břicháček

La 13-an de oktobro 2025 pasis cent jaroj ekde la naskiĝo de la eksa brita ĉefministrino Margaret Thatcher. En tiu kunteksto mi ŝatus dividi unu personan memoron.

Mi havis la honoron vidi la baroninon Thatcher per propraj okuloj. Tio okazis la 17-an de novembro 1999. Estis unu el tiuj tagoj, kiujn oni ne forgesas. La tuta lando vivis la dekkvinan datrevenon de la falo de komunismo. La etoso estis festoplena, agrabla, digneca, aŭtenta.

Margaret Thatcher venis en Pragon por partopreni la festojn kaj ricevi la Ordenon de la Blanka Leono. Dum sia programo ŝi ankaŭ havis la agrablan taskon malkaŝi la statuon de Churchill en la kvartalo Žižkov.

Mi tiam estis deksepjara kaj frekventis la septimon en gimnazio. Mi ekskuzis min en la lernejo por kelkaj horoj – tiam ankoraŭ ne estis ŝtatfesto – kun la rekta pravigo: „partopreno en la malkaŝo de la statuo de Winston Churchill“.

Kaj tiel, tiun memorindan tagon, mi estis ĉe tio. Kvazaŭ ĝi estus hieraŭ, klare mi memoras ŝin starantan tute vestita en nigra sur la scenejo apud Václav Klaus kaj la nepo de Churchill. Mi memoras, ke estis sufiĉe malvarme kaj ke la paroladoj ne estis bone aŭdeblaj pro malbona sono. Mi kunportis la libron *Jaroj en Downing Street* kaj esperis akiri aŭtogramon. Sed neniuj subskribsesio okazis.



Pri la parolado de sinjorino Thatcher mi kompreneble ne memorus jam, sed mi trovis ĝin ĉe la retejo de la Margaret Thatcher Foundation.

Thatcher dediĉis sin tiam ĉefe al libereco, kiu laŭ ŝi estis vizio de Churchill, kaj kiun ŝi nomis denaska homa rajto kaj necesa kondiĉo por morala elekto.

Ŝi konsideris esenca krei kondiĉojn en kiuj libereco povas flori:

„Krei aŭ reestabli politikan kaj ekonomian liberecon estas potenca defio. Vi devas limigi la potencon de registaroj, kies kreskon politikistoj ĉiam deziras. Vi devas certigi la sekurecon de privata posedaĵo kontraŭ egalismaj subtenantoj, kiuj nutras envion. Vi devas limigi impostadon kontraŭ premaj grupoj, kiuj volas ĉiam pli grandajn elspezojn. Ĉefe, vi devas konstrui kaj konservi honestan kaj klaran leĝaĵon, konscia, ke la

tentoj vendi influon, komerci per privilegioj kaj eviti regulojn neniam estas pli grandaj ol en tempoj de grava ŝanĝo.“

Laŭ Thatcher ripari la ĝeneralan kadron en lando kiel nia, „kie la radikoj de prospera kaj kultivita pasinteco neniam estis tute elradikigitaj de marksistaj vandaloj, estas relative simpla tasko. Pli malfacile eble estas enkonduki senton de persona respondeco, kiun ĉiespanta, ĉiesproviza kaj ĉieskontrola ŝtato neeviteble malfortigas. Longe post kiam socialisma ekonomio estis malkreditita, socialismaj sintenoj daŭre persistis. La kapablo preferi kombinaĵon de sendependado kaj risko super dependecon kaj certecon povas esti akirita nur post tempo. Vere, libereco kaj respondeco devas fariĝi dua naturo, antaŭ ol ili estos vere sekuraj.“

La Fera Damo finigis per la vortoj: „Neniu vizitanto de Prago dubas, ke inter la ĉefurboj de Eŭropo, via estas unu el la plej belaj, plej civilizitaj kaj plej ĉarmaj. Ĉiam, kiam mi venas ĉi tien, ŝajnas al mi, ke mi eniras mondon de majestaj preĝejoj, potencaj palacoj kaj evocaj statuoj. Tamen mi konfesas, ke mi tre ĝojas, ke vi trovis lokon por ĉi tiu nova statuo. Ĉi tie, meze de ĉiu ĉi tiu beleco, ĝi memorigos vin – ĉar ĉiu generacio bezonas ĝin – ke la prezo de libereco povas esti alta, ke ĝi vere povas postuli oferon de ‚sango, laboro, larmoj kaj ŝvito‘. Sed ĉi tiu statuo de Sir Winston Churchill ankaŭ memorigos al vi, kiel ĝi memorigas al mi, alian aferon – ke libereco neniam devas perei en la mondo, ke ĝi devas daŭri por ĉiam.“

Tio estis antaŭ dudek ses jaroj. Mi pasas ĉirkaŭ la monumento de Churchill en bonaj kaj malbonaj tempoj, foje kun rideto, foje kun zorgoj. Sed ĉiam la bildo de la 17-a de novembro 1999 kaj Margaret Thatcher aperas en mia menso, varmigante eĉ en la plej malvarma vintro kaj donante kuraĝon en laceco.



Jára da Cimerman

Karel Votoček



La plej eminenta eltrovinto, verkisto, komponisto, pentristo kaj skiisto el la tuta mondo estis forgesita ĉeĥa geniulo Jara Cimerman. Pri tiu fakto ni povas diskuti, ni povas disputi, ni povas eĉ malkonsenti, sed tio estas ĉio, kio estas tiukaze farebla.

Jara naskiĝis en Vieno en jaro 1857, 1864, 1872, 1887 aŭ en iu alia jaro. Distrikta matrikulisto estis ofte ebria, do liaj enskriboj estas malfacile legeblaj.

Kiel fakte estiĝis genieco de Jara? Ja liaj gepatroj estis simpla ĉeĥa tajloro Leopold Zimmermann kaj aŭstra teatra aktorino Marlen Jelinkova. Verŝajne ĉefa kaŭzo de lia genieco estas, ke li ne travivis puberiĝon (seksmaturiĝon). Liaj

gepatroj vestis lin dum lia infanaĝo per knabinaj vestaĵoj, kiujn demetis lia pli aĝa fratino Luisa. Plie Jara vizitadis knabinan lernejon (lernejon por knabinoj). Kiam li fine eksciis, ke li estas viro, tiam estis jam post lia pubereco, ĉar knabinoj maturiĝas pli frue. Tial restis al li multe da cerboĉeloj, kiuj kutime perdiĝas dum pubereco.

Ankoraŭ mi volus aldoni, ke la malgranda Jara vizitadis antaŭtagmeze ĉeĥan lernejon kaj posttagmeze germanan. Lia verkaro estas tial skribita parte ĉeĥe, parte germane. El tio konkludis aŭstria profesoro Fiedler (li estas nur mezlerneja profesoro, ne altlerneja!), ke Cimerman estas aŭstria geniulo, ne ĉeĥa. Sed ĉi tiun aserton ni povas facile refuti citante el lia CD (Cimrmanŭv denik – Taglibro de Cimerman), kie li skribas ĉeĥe laŭvorte: „Mi sopiras ekvidi fine mian patrujon – Böhmen.“

Dum sia junaĝo Jara interkonatiĝis ankaŭ kun Sigmund Freud, kiu foje vizitis lian patron por riparigi sian vestaĵon. Ĉi tiu eminenta psikoanalizisto vekis geniecon de la malgranda sentema infano. Post iom da tempo foriras Jara en la mondon (en aĝo inter 7 kaj 42 jaroj).

De tiu tempo ni trovas liajn spurojn fakte tutmonde. Al usona registaro li ofertas projekton de Panama-kanalo inkluzive de samnoma opero. Kun la grafo Zeppelin li konstruas unuan aerŝipon. Kiel anarĥisto li estis ekzilita

el Germanio. Ĉar en liaj dokumentoj aperis „konstruisto de maltrankvilo“, svisa firmao OMEGA petis lin, ke li pliperfektigu ĝian horloĝon. Cimerman ankaŭ funkciis en la svisaj Alpoj kiel akuŝisto, ĉar akuŝistinoj ofte ne povis vintre atingi ĉiujn lokojn (sur skioj). Poste Cimerman esploris vivstilon de eskimoj. Bedaŭrinde tiam li maltrafis nordan poluson je 7 metroj. En Paragvajo li fondas marionetan teatron por klarigi al kamparanoj nocion „pup-registaro“. Kiel meblar-agento li troviĝas inter gaŭĉoj en Argentino. En Johanesburgo (Sud-Afriko) li fondas muzeon de vaksaj statuoj. Konata estas precipe duopo: Kolombo frakasanta ovon kontraŭ la frunto de Napoleono. Certe estas konata ankaŭ plia lia skulptaĵo: Taras Bulba antaŭ Konstanca konsilio. Baldaŭ Cimerman rapidis al alia lando. Tial li vendis sian vaksan muzeon al iu nekonata sinjorino el Londono.

Cimerman kaj Esperanto (1996)

Dum ĉijara UK en Prago, kiun mi partoprenis, estis aŭdeblaj multaj prelegoj pri internacia lingvo kaj pri komunikado ĝenerale. Simile kiel doktoro Svěrák el la teatro JDC (vidu la teatraĵon Enketado pro perdo de klaslibro) ankaŭ mi notis streketon en notlibron ĉiam, kiam dum prelegoj aŭdiĝis nomo Cimerman.

Kaj imagi, eĉ ne unufoje, karaj geamikoj! Tamen laŭ mia opinio ĝuste Cimerman apartenis al unuaj eltrovintoj de internacia lingvo, komuna por ĉiuj bonvolaj homoj.

Cimerman mem estis poligloto, sen problemoj li ellernis baznivele ĉiun ajn lingvon. Sed dum sia aventurema vivo li konstatis, ke aliaj homoj ofte ne havas similan persistemon. Tial li cerbumis, kiel ebligi internacian komunikadon ankaŭ por la malpli laboremaj personoj.

Gravan momenton en lia strebado prezentas jaro 1887. Tiam Cimerman instruis en elementa lernejo de vilaĝo Struk en Galicio. La jaro estis vere fruktodona. Cimerman ne nur farbis lernejon kaj apogis ĝin el suda flanko por ŝirmi ĝin kontraŭ nordaj ventoj, sed ĉi tie li dum instruado rimarkis, ke parto de infanoj nek atentis lian instruadon nek skribas en kajeron liajn eldirojn. Li logike opiniis, ke la infanoj malbone vidas, tial li akompanis ilin al proksima urbo Bialystok al okulkuracisto por konfirmi sian opinion. La okulkuracisto, iu doktoro Zamenhof, post funda esplorado konstatis, ke la infanoj vidas bonege, sed ili tute ne komprenas la instruiston, ĉar ili estas nek poloj nek ukrainanoj, kiuj komprenus la ĉeĥan lingvon, sed hungaroj.

La kuracisto samspire konfidis al Jára, ke li jam longe strebas krei internacian lingvon, kiun li provizore nomis „Esperanto“. Tiu ĉi ideo ekplaĉis al Jára tiel, ke li tuj proponis al doktoro Zamenhof sian kunlaboron, kiu estis kun plezuro akceptita.

Zamenhof unue intencis elekti el diversaj lingvoj samsonajn vortojn, kiuj fariĝos fundamento de estonta lingvo. Ĉi tiun ideon Cimerman senriproĉe aprobis. Zamenhof plue proponis, ke la plej gravaj elektitaj vortoj enhavu literon „y“, ĉar tiel ili estos bone memoreblaj, sed Jára ĉi tiun proponon akre rifuzis atentigante, ke unu litero „i“ en lingvo certe sufiĉas. Li rekomendis prefere eluzi por ĉiu vortospeco saman finan literon. Ĉar en aboco estas pli da literoj, ol kiom da vortospecoj ekzistas, fine estis elektitaj nur vokaloj. Vokalo „a“ fariĝis finaĵo de adjektivoj,

„-e“ adverboj,

„-i“ verboj en infinitivo,

„-o“ substantivoj kaj

„-u“ verboj en volitivo.

Eble vi iom miras, kial ĝuste verboj havas tian preferon, dum por numeraloj, pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj la fina vokalo mankas. Origine Zamenhof proponis por volitivo finan konsonanton, sed post mallonga diskuto, kiam li leviĝis el la planko, li volonte konsentis, ke volitivo plej bele sonas kun la finaĵo „-u“.

Ambaŭ amikoj certe daŭrigus la dialogon, sed lacigitaj infanoj jam dormetis sur divano kaj botelo de prunbrando estis malplena. Tial Jára decidis reveni hejmen promesante al Ludoviko baldaŭan lingvistikan sesion ĉe plena botelo.

Sed kiel li estis surprizita, kiam Ludoviko ne nur ne plu venis al li, sed li malpacience lanĉis sian verkon pri internacia lingvo sen mencio pri kunlaboro kun JdC (Jára da Cimerman).

Kompreneble la numeraloj, prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj havis diversajn finaĵojn sen iu ajn normo, la personpronomoj eĉ finiĝis per litero „-i“ same kiel verbaj infinitivoj. Kaj kiel Zamenhof furiozis ĉe la ceteraj pronomoj! Klopodante realigi sian originan ideon pri la sama komenca litero (anstataŭ la fina, kion proponis Jára) li dividis pronomojn je nedifinaj, montraj, demandaj, kolektivaj kaj negativaj rezervante por ĉiu grupo apartan komencan literon!

Tiel fuŝita lingvo kompreneble ne plaĉis al la kolerigita Cimerman. Gloro pro eltrovita lingvo ja plene apartenas al Zamenhof, sed samtempe estiĝis neceso persvadi la homaron pri avantaĝoj de Esperanto por internacia komunikado. Kvankam li jam 80 jarojn tion direktas de supre (el la ĉielo), entute eblas diri, ke li sukcesis nur ĉe la plej volontemaj volontuloj.

Kia estas via opinio?

Rimarkigo: Pro pli facila prononcado fare de eksterlandanoj mi uzas anstataŭ ĉeĥa nomo Cimrman slovakon version Cimerman.

En ĉeĥa lingvo lernantoj lernas parkere vortojn, kiuj enhavas „y“. Oni nomas ilin elektitaj vortoj. Temas pri proksimume 60 vortoj.

Doktoro Cimerman

Daŭra heredo de Majstro Jara Cimerman en medicino restis ĝis nun lia substrekado de medicina prevento. Ekzemple el statistiko de infarktaj kialoj, kiu estis kompilita dum jaroj 1876–1903 en viena imperiestra kaj reĝa hospitalo Jara konstatas, ke neniu persono trafita per infarkto sidis tiutempe sur pispoto. Ĉi tiu malkovro kaŭzis lian pasian rekomendon por sidado sur pispoto kiel prevento kontraŭ infarkto. Multaj liaj pacientoj ja estis unue same entuziasmaj, sed iom-post-iome ili elravigadis. Kompreneble tio plej malutilis al ili. Forstisto Rudolf KRAUS el la urbo Choceň post 10 tagoj de sidado sur pispoto enuige ekstaris kaj elĵetis pispoton tra fenestro. Kaj fakte; pasis eĉ ne 17 jaroj, kiam lin mortigis infarkto.

Aposteriora triangulado

Ĉeĥa geniulo Jára Cimerman famiĝis ankaŭ kiel termezuristo. Li inventis metodon de aposteriora triangulado. – Triangulado estas geodezia metodo kun apud si kuŝantaj trianguloj. Unu triangulo estas precize mezurita, en la aliaj sufiĉas mezuri nur angulojn, la restaj elementoj estas facile kalkuleblaj. – Kontraŭe Cimerman unue difinis distancojn inter gravaj urboj tiel, ke ili estu bone memoreblaj, poste ilin instruis al siaj lernantoj kaj fine mezuris ilin per sia guma metro. Kompreneble li zorgis pri tio, ke la mezuritaj distancoj estu la samaj, kiel la antaŭe difinitaj. Lia fama guma metro estis longtempe ekspoziciita en franca SEVRES en fako: Fortimigaj ekzempleroj. Ĝi estis redonita al Ĉeĥoslovakio nur merite de komunisma partio, kiu per ĉi tiu metro praktikis propran sloganon: Ni ĉiuj estas egalrajtaj.

Termezuristo Cimerman

Cimerman estis tiel pasia termezuristo, ke liaj samtempuloj povis lin multfoje observi, kiel li marŝas kun teodolito tra la valo de la vilaĝo Liptákov por ĝuste almezuri terpecojn pro konstruado de Olimpika stadiono kaj Olimpika vilaĝo kun pajlofaskaj tegmentoj. Olimpikoj en Liptákov estis planitaj por la jaro 1924. Ĉiuj homoj kalkulis pri ĉi tiu plano, eĉ kiam Cimerman en la jaro 1914 malaperis. Bedaŭrinde plimulto da lokaj preparantaj komitatanoj estis ankaŭ pasiaj abelbredistoj kaj pro kurioza renkontiĝo de cirkonstancoj forflugis iliaj abelaroj ĝuste en la tago de internacia inspekto. Sekve de tio estis la valo barita kaj ŝvelintaj Olimpikaj altranguloj estis enhospitaligitaj en la plej proksima malsanulejo kun pluraj mentonoj kaj Olimpikaj cirkloj sub okuloj. Kiel post ĉi tiu katastrofo mienis lokaj preparantaj komitatanoj ne necesas priskribi. Tial la Olimpikoj okazis fine en Parizo.

Cimerman kompreneble aktivis multflanke, sed ne ĉiam liaj inventoj sukcesis. En la jaro 1911 dum lia provo superi mondan rapidecrekordon, kiun tiutempe posedis usonano Campbell, Jara iniciateme apud Brno surterenigis 12 kilometran rapidvegon. Tie li volis superi rapidecon, kiu estis antaŭe atingita ĉe Granda Sala Lago. Fiksado de la vego en tereno baldaŭ sukcese finiĝis. Lia aerodinamika garbveturilo (modeste nomumita JARA-1) kun kalva ĉaristo Navrátil vere superis la rekordon. Ĝi atingis averaĝan rapidecon 149 km/h. La rekordo validis ĝis jaro 1921, kiam sur la sama vego estis unuafoje surtere mezurita supersona rapideco. Tial la longeco de la vego estis kontrolita per teamo da spertuloj, kiuj poste konstatis, ke la longeco laŭ Cimerman estis 12.8 oble pli granda ol la reala. La rapidrekordo de Majstro estis ĝustigita al 11.6 km/h (tamen por garbveturilo ĝi signifas relative kontentigan rapidecon) kaj lia nomo estis forigita el tabelaro de Internacia Aŭtomobila Federacio. Kaj ne nur el ili.

π (pi)

En jaro 1903 Jára Cimerman konstatis, ke 3 estas universala konstanto. Ekzemple lumrapideco estas 300 000 km/sec, sonrapideco 300 m/sec, temperaturo varias ĉirkaŭ 300 K (27 °C) eĉ en Edeno estis 3 – Adamo, Evo kaj Dio. Tial li konkludis, ke ankaŭ numero de Ludolf – π valoras 3. Sed ĉi tiu konkludo ekscitegis mondan sciencon komunumon tiel, ke ĝi petis sian eminentan matematikiston David Hilbert, por ke li delikate reakordigu la aferon. Hilbert tuj sendis al Cimerman ĝentilan leteron, en kiu li sciigis al li, ke se li tuj ne redonos tiun 0.141 592 653 58... ricevos al sia buŝaĉo solidan pugnofrapon. De tiu tempo estas π denove 3.141 59... kun escepto de Sovetunio dum jaroj 1932–1935, kiam Centra Komitato de Komunisma Partio decidis en kadro de kampanjo „Okcidenton ni ne nur ĝisatingos, sed ankaŭ devancos“ altigi valoron de π ĝis 3.2.

Sahara

Kiam Cimerman planis regulan trajnan trafikon trans la dezerton SAHARA, li havis malfacilaĵon kun movilo de lokomotivoj. Ja en Saharo troviĝas nek karbo por vapormaŝinoj, nek dizeloleo por naftaj motoroj, nek kurento por elektromotoroj. Tial li inventis motoron pelitan per kompresita vakuo! Bedaŭrinde unusola tiel konstruita lokomotivo estis en la oaso VAV EL KABIR detruita de Beraberoj (religiaj fanatikuloj) kiel produkto de nekredanta homo, tial lia fenomena inventaĵo estis denove forgesita kaj nun ĝi atendas sian duan eltrovon.

Miraklo

Kiam Cimerman estis sanktigita, multaj homoj preĝis al li. Iu grave malsana virino intense preĝis por sia sano, por ke ŝi povu zorgi pri siaj malgrandaj infanoj. Kiam ŝi ekdormis, aperis antaŭ ŝi Jara Cimerman kaj konsilis: „Fratino, iru al doktoro!“ Ŝi obeis kaj doktoro sanigis ŝin.

Norda poluso

Por atingi nordan poluson uzis Cimerman kiel la unua sledon tiritan per 59 polusaj katoj. Tiutempe kutimajn hundojn li ne ŝatis, ĉar ili bojadas, hurladas kaj difference de katoj ili ne havas 9 vivojn. Kiam arkta urso forvoros hundojn, plua vojaĝado fariĝas malfacila, dum ĉiun katon devas la urso forvori naŭfoje, sed kutime ĝi post kvara forvorado jam estas trosatigita kaj devas ripozi kaj trankvile digesti.

Trajno

El statistiko de trajnaj akcidentoj Cimerman konstatis, ke krom lokomotivo estas plej ofte difektita lasta vagono. Li tuj proponis reformon. Antaŭ ekveturo lastan vagonon de la trajno malkonekti.

Sukero

En „Perioda tabelo de elementoj“ Cimerman konsideris elementon numero 16 – sukeron radioaktiva. Nome li metis sukerkubon en teon kaj malkovris, ke post 30 sekundoj ĝi tute disfalis. Do ĝia duontempo de disfalo estas 15 sekundoj. Kaj „duontempo de disfalo“ estas kutime uzata ĉe radioaktivaj elementoj. Tial Cimerman konstatis, ke ankaŭ sukero estas radioaktiva. Kompreneble ni hodiaŭ scias, ke li eraris, ke tio ne estas vero kun escepto de norda Ukrainio (Ĉernobilo).

Biero

En sia taglibro Cimerman ĉiam menciadis gravajn momentojn de sia vivo. Tial ni eksciis pri lia vizito de urbo Plzen. Bedaŭrinde nun multaj sciencistoj disputas, kial fakte Cimerman vizitis la urbon? Frazo en lia taglibro: „Al urbo Plzeň mi venis pro bongusta b...“ ne plu estas legebla.



Verda stelo

Stanislav Schulhof

Bruas vento furioza,
konvulsias ŝip' kaj velo.
Granda maro ondiĝita
kun la nokto kunmiksita
– malproksima nia celo.

Tremas, krakas nia ŝipo,
masto ĝemas en la vento.
Sang' en korpo malvarmiĝas,
vort' en buŝo silentiĝas,
koron premas antaŭsento.

Ĉie ĝemo, plendo, timo.
Nur la homo sur la ponto
firme, kiel ensorĉite,
tondron, pluvon, ĉion spite
vagas en la horizonto.

Vagas en la horizonto,
sed ne trovas sian celon.
En ribel' de l'elemento,
en la periega vento
perdis sian verdan stelon.

Ĉu vi konas verdan stelon,
tiun stelon de l'idaro?
Naskis ĝin la oriento,
ekbrilis en okcidento,
en Bulonjo sur la maro.

Kia estas verda stelo?
Malgrandeta kiel lento,
sed se lumo ĝia brilas,
tuj glacioj malaperas
kaj varmiĝas kontinento.

Bouří vichry, v zuřivosti
naráží na loď i plachtu.
Rozbouřené širé moře
s běsy noci spojilo se
dlouhou máme ještě plavbu.

Naše loď se zmítá, praská,
čele vichru stožár sténá,
tělo bledne, chlad se vkrádá,
slov se ústům nedostává,
předtucha zlá srdce svírá.

Vůkol bědy, steny, strachy.
Jen na můstku člověk stojí,
pevně, jak by zaklet kouzly,
nedbaje na hromy, blesky,
k obzoru svým zrakem hledí.

Toulá se po horizontu,
hledá cíle pro svou cestu.
Když za vzpoury elementů
odklonil jej poryv vichru,
ztratil výhled na svou hvězdu.

Znáš tu hvězdu, zelená se,
generacím oporou je?
Zrodila se na východě,
zatřpytila na západě,
v Buloni – přímořském městě.

Jaká že je tato hvězda?
Jako zrnko drobná zdá se,
pokud světlem rozžehne se,
led pod jejím svitem taje,
sám kontinent zahřívá se.

Nur kriegu, brua maro,
vana via granda forto!
En malgranda luma lento,
kiun naskis l'oriento,
bazas nia kor' kaj sorto.

Verda stelo, – mova forto,
ho, aperu en la nubo!
Lumu en la krizmomento,
masto ĝemas en la vento,
malfermiĝas nigra subo.

Jen buracej moŝe hluĉné,
marná je ti všechna zloba!
V droboulinkém zrnku světla,
ukrytá je naše síla
síla srdce naše sudba.

Vyjdi z mraků naše hvězdo,
zůstaň pro nás hybnou silou!
Prosвіт' každou chvíli těžkou,
i když vichry stěžně lámou
či loď pluje nad hlubinou.

Ĉeĥa traduko: Jiří Altior

Febrosonĝa nokto

Julio Bághy

Kiam la nokt' bruligas stelomeĉojn
Kaj lunradian pompon prenas al si,
Sopiroj ludas sur la lir' arpeĝojn,
La koron sentoj vekas kanti, valsi...

Ah, venu... venu! Vin mi vokas,
pelas
Suferi pli la kor' ne povas plu jam.
Jen, vidu, via sklavo ekribelas;
Li volas havi vin aŭ morton tujan...

Sed jen la tag' estingas stelomeĉojn
Kaj vekas sin ĉagrenoj, zorgoj en
ĝi;
Mutigas peza jugo la arpeĝojn
Por revteksadon de la koro —
venĝi...

Aperas vi, ankora altarbildo,
La brakojn etendante voke al mi;
Al peksopiro venas ĉasta virto
Por fali kaj pagane psalmi...

Dum tikla sago de Amoro sorĉas,
Ni mordas nin per kis' por kison
gajni.
Momentoj febraj rozoĉenon forĝas;
En ĝi pereas vi amata kaj mi...

El la epistoloj de sankta Paŭlo

Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo.

Kdybych měl dar prorocství, rozuměl všem tajemstvím a obsáhl všechno poznání, ano, kdybych měl tak velikou víru, že bych hory přenášel, ale lásku bych neměl, nic nejsem.

Kaj se mi disdonus mian tutan havon por nutri la malsatulojn, kaj se mi lasus mian korpon por forbrulo, sed ne havus amon, per tio mi neniom profitus.

Láska je trpělivá, laskavá, nezávidí, láska se nevychloubá a není domýšlivá. Láska nejedná nečestně, nehledá svůj prospěch, nedá se vydráždit, nepočítá křivdy. Nemá radost ze špatnosti, ale vždycky se raduje z pravdy. Ať se děje cokoliv, láska vydrží, láska věří, láska má naději, láska vytrvá.

Amo neniám pereas; sed, ĉu estas profetadoj, ili neniigoj; ĉu lingvoj, ili ĉesigoj; ĉu estas scio, ĝi neniigoj. Ĉar ni scias laŭparte, kaj ni profetadas laŭparte; sed kiam venos perfektaĵo, tiam neniigoj tio, kio estas laŭparte.

Dokud jsem byl dítě, mluvil jsem jako dítě, smýšlel jsem jako dítě, usuzoval jsem jako dítě; když jsem se stal mužem, překonal jsem to, co je dětinské.

Kdybych mluvil jazyky lidskými i andělskými, ale lásku bych neměl, jsem jenom dunící kov a zvučící zvon.

Kaj se mi posedus la profetpovon, kaj komprenus ĉiujn misterojn kaj ĉian scion; kaj se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi montojn, sed ne havus amon, mi estus nenio.

A kdybych rozdal všechno, co mám, ano, kdybych vydal sám sebe k upálení, ale lásku bych neměl, nic mi to neprospěje.

Amo longe suferas, kaj bonfaras; amo ne envias; amo ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, ne kondutas nedece, ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas malbonon, ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas kun vereco; ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas.

Láska nikdy nezanikne. Prorocství – to pomine; jazyky – ty ustanou; poznání – to bude překonáno. Vždyť naše poznání je jen částečné, i naše prorokování je jen částečné; až přijde plnost, tehdy to, co je částečné, bude překonáno.

Kiam mi estis infano, kiel infano mi parolis, kiel infano mi sentis, kiel infano mi pensis; nun fariĝinte plenaĝulo, mi jam forigis la infanaĵojn.

Ĉar nun ni vidas per spegulo, malhele; sed tiam okulon ĉe okulo; nun mi konas laŭparte; sed tiam mi konos tiel same, kiel ankaŭ mi estas konita.

A tak zŭstává víra, naděje, láska – ale největší z té trojice je láska.

Ho, profundo de riĉeco kaj saĝeco kaj scio de Dio! kiel neesplorable estas Liaj juĝoj, kaj nesekveblaj Liaj vojoj! Ĉar kiu sciis la spiriton de la Eternulo? aŭ kiu estis Lia konsilanto? aŭ kiu antaŭe al Li donis ion, poste redonotan al li? Ĉar el Li kaj per Li kaj al Li estas ĉio. Al Li estu la gloro por ĉiam.

Oškľivte si zlo, lněte k dobrému.

Ne venkiĝu de malbono, sed venku malbonon per bono.

My silní jsme povinni snášet slabosti slabých a nemít zalíbení sami v sobě.

La frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado.

Nyní vidíme jako v zrcadle, jen v hádance, potom však uźřime tvář v tvář. Nyní poznávám částečně, ale potom poznám plně, jako Bůh zná mne.

Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo.

Jak nesmírná je hloubka Božího bohatství, jeho moudrosti i vědění! Jak nevyzpytatelné jsou jeho soudy a nevystopovatelné jeho cesty! „Kdo poznal mysl Hospodinovu a kdo se stal jeho rádcem?“ „Kdo mu něco dal, aby mu to on musel vrátit?“ Vždyť z něho a skrze něho a pro něho je všechno! Jemu buď sláva na věky.

Abomenu tion, kio estas malbona; algluiĝu al la bona.

Nedej se přemoci zlem, ale přemáhej zlo dobrem.

Ni, kiuj estas fortaj, devas porti la malfortaĵojn de la nefortaj, kaj ne plaĉi al ni mem.

Ovoce Božího Ducha ... je láska, radost, pokoj, trpělivost, laskavost, dobrota, věrnost, tichost a sebeovládání.



La Kroniko de Esperanto en Prago

Ĉu vi konas, ke la Esperantista klubo en Prago havas sian ampleksan kronikon, kiu komenciĝas ĉe la jaro 1889 kaj daŭrigas ĝis nuntempo? Ĝi estas elektronika kaj vi trovos ĝin en la paĝo <http://bulteno.cs-retromusic.net/kroniko.pdf>.

Termíny schůzek do června 2026

4. 12. / 18. 12. // 15. 1. / 29. 1. // 12. 2. / 26. 2. // 12. 3. / 26. 3. // 9. 4. / 23. 4. // 7. 5. / 21. 5. // 4. 6. / 18. 6.

Program sledujte na <https://eventaservo.org/o/EO-Prago>.

Klub esperantistů v Praze,
pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo:	Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00
Web:	https://eventaservo.org/o/EO-Prago
E-mail:	paha@esperanto.cz
Facebook:	https://www.facebook.com/esperantoprado
YouTube:	Esperanto Prago
Schůzky:	Revoluční 5, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00